

sub la suda kruco ★
decembro 2014

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 22 [3] numero 117 decembro 2014

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de februaro 2015

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2014 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO La dek du apostoloj, Viktorio.

SUR LA MALANTAŬA KOVRILO Konstruaĵo de la Reĝa Ekspozicio, Melburno.

5. La Danĝeroj de Supozado



6. Bela fabela mondo de Nicole



8. Pri Australia Felix



12. Teatrumado en Adelajdo



14. La Stranga Sono



16. Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!



17. Holmso en esperantaj vestoj



19. Memoriga Cerebro de Tilly Aston



23. Interesaj vidindaĵoj en la aŭstralia ĉefurbo, Kanbero

decembro, du mil dekkvar

Ĉi tiu numero de ESK estas speciala ĉar ni ne intencis eldoni ĝin ĝis post la kongreso en Melburno. Tamen, ni jam havis kelkajn artikolojn kaj, pro tio, ni decidis eldoni ĝin kiel surprizan post-Kristnaskan donacon por vi. Bedaŭrinde, ne restis sufiĉa tempo por ricevi kontribuon de voluntulo pri lia/ŝia sperto kiel esperantisto, kiel mi faris en la pasinta numero. Tamen, ek al verkado pri viaj aventuroj en Esperantujo por la venonta numero de ESK. Mi eĉ donacos botelon da nov-zelanda vino al la unua kiu sendos tian artikolon. Eble niaj legantoj en Aŭstralio ne scias ke nov-zelandaj vinoj estas ege bonaj kaj ofte gajnas internaciajn premiojn. Mi estas certa

ke vi trovos multajn botelojn en vinovendejoj en Aŭstralio.

Ĉi-sube estas foto de la regiono de centra Otago en la suda parto de la suda insulo. Tiu regiono (apud Queenstown) estas pitoreska regiono kaj mi ŝatas iri tien. Eble kiam ni emeritiĝos mia edzino kaj mi iros loĝi tien. Certe tre malvarmas en la vintro kaj neĝo kovras la montaron kiun miloj da aŭstralianoj ŝatas viziti per rektaj flugoj el Aŭstralio por skii. Tamen, en la somero la vetero estas sufiĉe bela. Centra Otago famas pro siaj diversaj vinoj. Imagu sidi antaŭ ĉi tiu pejzaĝo kun glaso da bongusta nov-zelanda vino.



La Danĝeroj de Supozado

DE JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Antaŭ multe da jaroj, kiam mi laboris por la Art-Galerio de Nov-Sud-Kimrio, mi funkciigis veturantan artan servon, nomitan “Onsight”*. Mi transportis, per kamioneto, artekspozicion al homoj, por kiuj vizito al la Galerio estus malfacila aŭ neebla, ekzemple al malliberejoj, malsanulejoj kaj hejmoj por plejaĝuloj. Iun tagon, mi vizitis plejaĝulan hejmon en norda stranda antaŭurbo de Sidnejo. Mi starigis la ekspozicion kaj poste parolis kun kelkaj loĝantoj pri la artaĵoj.

Post tagmanĝo, flegistino puŝis tre maljunan, malfortikan virinon en rulseĝo, en la ĉambron.

Malgraŭ ke la virino ne rigardis supren al la pentraĵoj, mi alproksimiĝis kaj ekparolis. Preskaŭ tuj, la flegistino diris al mi, ‘Ne ĝenu vin, ŝi estas mense nekompetenta.’ Mi scivolis, do, kial ŝi venigis la virinon! Mi diris al la flegistino, ‘Plaĉus al mi puŝi ŝin; havu ripozon.’ Ŝi dankis min kaj foriris.

Mi puŝis la rulseĝon kaj provis paroli kun la maljunulino pri la pentraĵoj, sed mi baldaŭ sciigis ke ŝi aŭ ne komprenas ion ajn, aŭ tute ne interesiĝas pri arto. Do, mi diris al ŝi, ‘Ŝajne, arto ne estas via “afero”’. Do, kio interesas vin?’ Mi ne antaŭvidis respondon sed post mallonga paŭzo ŝi parolis:

‘Ho, pendoglisado, malsuprenirado per ŝnuro, kaŭĉukosaltado...’ Mi momente silentis per surprizego,

kaj pensis al mi, ‘Ĉu ŝi fakte ŝercas kontraŭ mi?’ Sed ŝia humuro fascinis min kaj mi demandis plu. Mi lernis ke ŝi estis la dua virino en Nov-Sud-Kimrio kiu pilotis aviadilon! Do, ŝi verŝajne ankaŭ faris tiujn aliajn agadojn.

Mi komprenis: tie estis virino, kiu antaŭe havis tre ekscitan, aktivan vivon, sed nun havis tre malmulte da libereco kaj movebleco. Mi tute ne surpriziĝis ke ŝi ne havas intereson pri la pentraĵoj. Ne gravis; plaĉis al mi anstataŭe aŭskulti rakontojn pri ŝiaj mirindaj aventuroj. Post ĉirkaŭ dudek minutoj, kiam estis preskaŭ tempo por reveno de la flegistino, la virino suprenrigardis al la pentraĵoj, kaj unu aparte. ‘Mi ŝatas tion,’ ŝi diris.

Tiam la flegistino revenis. Estis tempo por la maljunulino por reiri al ŝia ĉambro.

Poste, mi pensis pri kio okazis. Se mi supozus – ĉar la virino unue montris neniun intereson pri arto – ke paroli kun ŝi ne indus, mi neniam lernus pri ŝia mirinda vivo. Kaj ŝi ne ĝuus (eĉ se nur iomete) pentraĵon. Mi scivolas ĉu la flegistino sciigis ke mi fakte povis komuniki kun la “mensa nekompetentulo” malgraŭ ŝia konsilo.

* “Onsight”: ludema hibrido de la anglaj vortoj “onsite” = ĉe la loko, kaj “on sight” = pri vido)

Bela fabela mondo de Nicole

INTERVJUIS KATJA STEELE (ADELAJDO)

Nicole Else estas multfaceta esperantistino kiu verkis lernolibron pri lingvoj por infanoj *Foreign languages: what they don't often tell you*, skribis multajn artikolojn rilate Esperanton, kreis 15-minutan filmon *La unua kiso*, en kiu aktoras esperantistoj el la regiono de Sidnejo, provlegis centon da novaĵleteroj, kreis retejojn kiel www.worldlanguage.info, metis pli ol 100 filmetojn sur YouTube.

Tio, kion ne multaj scias, estas ŝia ĝenerala intereso pri diversaj lingvoj. Ĝuste ĝi gvidis Nicole al alia interesa aktivado: esperantigo de fabeloj por kompanio Bukboks (angle BookBox). Kelkajn el ili ni komune spektis dum la januara somerkursaro en Kanbero kaj sekve mi demandis pri tio al Nicole.

Kiel komenciĝis tiu ĉi via laboro?

Iam en 2010 mi serĉis en la reto ion en la rusa kaj hazarde trovis Bukboks. Plaĉis al mi ke ĝiaj fabeloj aperas en pluraj lingvoj do, se vi ne sufiĉe komprenas unu lingvon, vi povas elekti alian kaj povas ankaŭ kompari la du versiojn. Krome dum vi aŭdas la rakonton, aperas ankaŭ subtitoloj en la sama lingvo. Tio multe helpas al personoj kiuj nur lernas la koncernan lingvon kaj ankoraŭ ne bone regas ĝin.

Kiam vi decidis esperantigi la fabelojn?

En la ĉefpaĝo (BookBox.com) estis butono kun funkcio: aldonu lingvon. Jes, mi povas aldoni Esperanton – mi decidis tuj ne imagante ke mi pasigos tiom multe da tempo ĉe tiu projekto.

Kiu estis via unua fabelo?

La unua puto.

La fabeloj estas nelongaj, ŝajnas simplaj. Ĉu estis facile esperantigi



Nicole Else, kiu tradukis la originalan tekston al Esperanto

ilin?

Kvankam la teksto ne estis komplika, mi ja devis uzi mian PIV kaj iom cerbumi! Traduki ne estas tre facila tasko. Sed la traduko estas nur eta parto de la laboro. Post ĝi mi devas dividi la tekston por ĉiu ekrana bildo kaj foje malfacilas paraleligi ĝin kun tiu en la originala angla versio. Se tio pretas, mi ekserĉas laŭtleĝantojn. Ĝis nun mi havis Jonathan Cooper, Tim Stackpool, mi mem legis unu



Sceno el la bildrakonta filmo "Mikelo la Sitelo"

fabelon, foje iu franco, alifoje iu usonano... Estas temporaba tasko. Temas ne nur pri klara prononco, sed ankaŭ pri la ĝusta laŭteco kaj absolute senbrua fono. Unu kroatino plurfoje provis legi, sed ŝi loĝis en apartamento kaj neniam sukcesis registri sen bruoj. Se mi trovas nur unu eraron, mi resendas la tekston al la leginto (ĉio okazas rete, neĉeeste) kaj okazis ke mi devis atendi dum monatoj, ĝis mi rericevis la legaĵon en la ĝusta formo.

Kaj tiam vi pludonas la laboron al Bukboks?

Jes. Ankaŭ ili kontrolas la faraĵojn kaj okazis ke tio, kion mi konsideris bona, al ili ne sufiĉis, ili aŭdis bruojn, trovis tro aŭ maltro rapida la voĉlegadon... Kiam ni solvas tiujn problemojn, ili resendas la materialon al mi por fina kontrolo. Foje mi

trovas tajperarojn, foje estis malĝuste skribita la nomo de la laŭtlekanto ks. La preta produkto estas fine metita al YouTube kaj videbla senpage.

Kiom da fabeloj vi tradukis ĝis nun?

Dek tri. La dek kvara estas preparata.

Kia estas la reago de la publiko?

La komentoj en YouTube estas plejparte pozitivaj. Kelkaj ja ankaŭ kritikas, ekz. ke mi elektis por traduki "Santa" kiel "Patro Kristnasko". Laŭ mi temas ne pri objektivaj kriterioj, sed simplaj personaj preferoj. Iuj preferus "Avo Frosto".

Vi dediĉas al la fabeloj multe da tempo kaj laboro. Kial?

Ĉar ne estas sufiĉaj tiaj fabeloj por infanoj. Kaj ankaŭ la komencantoj ŝatas ilin. Kelkaj fabeloj havas gravan ekologian direndaĵon – tio allogas

min, aŭ simple temas pri interesa, por mi nova fabelo.

Ĉu iu el viaj tradukaĵoj estas aparte kara al vi?

Mi ŝatas *Mikelo la sitelo* (*Tucket the bucket*) pri malnova sitelo por kiu oni trovas novan utilon.

Evidente tiu ĉi laboro kontentigas vin kaj vi iĝas pli kaj pli lerta pri ĝi. Ĉu vi pensis pri alia simila tasko?

Eble *Blinky Bill*. Espereble iam eblos traduki ĝin senpage, ĉar Yoram

Gross (la aŭtoro) tre simpatias al Esperanto.

Mi deziras, ke estu tiel kaj ke dume kaj vi kaj ankaŭ la legantoj de la Bukboks-rakontoj multe ĝuu la belajn fabelojn.

Aldono: BookBox fondis Brij Kothari en 2004. Esperanto estas la 31-a lingvo uzata de la kompanio. Pli da informoj legu ĉe:

www.ipernity.com/blog/158659/351711


Pri Australia Felix

INTERVJUIS KAM LEE (HOBARTO)

Trevor Steele estas eminenta aŭstralia aŭtoro de verkoj en Esperanto. Li verkis almenaŭ 15 esperantajn librojn. Lia unua libro *Sed Nur Fragmento* estis presita en 1987 kaj lia sepa libro estas *Australia Felix*, presita en 1999. Neeblas laŭ mi pensi pri aŭstralia literaturo dum la nuna epoko sen la nomo Trevor Steele. Mi konas lin dum multaj jaroj ĉefe dum liaj viglaj lecionoj, prelegoj, kaj interesaj renkontoj dum aŭstraliaj somerkursaroj kaj kongresoj. Tamen estas nur nun ke mi havas la okazon por profunde esplori la literaturajn ideojn de ĉi tiu mensriĉa esperantisto.

Kiom da rakontetoj havas Australia Felix?

Estas 11 eroj, el kiuj 7 estas noveloj kaj la aliaj estas grandparte



Trevor Steele

vojaĝraportoj.

Kio instigis vin verki la libron?

Mi estis tiutempe en Litovio kiu estas tre malgranda, verda lando, multrilate ege malsimila al Aŭstralio. Mi sentis bezonon refoje ligi min al mia naskiĝlando, kaj do turnis mian atenton al ĝi kaj trovis ke eblas kunmeti malgrandan libron el rakontoj.

Kial la libro ne havas titolon en Esperanto?

Kiel mi klarigas en la enkonduko de la libro, la frua esploristo majoro Mitchell transmarŝis sudorientan Aŭstralion dum tre bela sezono (ĉio estis verda) kaj li uzis la latinan esprimon por “feliĉa Aŭstralio”. En tiu tempo “Aŭstralio” ankoraŭ ne ekzistis, estis nur diversnomaj kolonioj, kaj la termino Aŭstralio estis literatura.

Ĉu vi decidis la titolon antaŭ, dum, aŭ post kiam vi verkis la libron?

Preskaŭ ĉiam la titolo estas la lasta detalo: ĉi-kaze certe jes.

Ĉu la ordo de la rakontetoj signifas ion?

Ne laŭ mia scio. Retrospekte mi vidas ke la ĉefaj verkoj (pri aborigenoj) troviĝas en la mezo de la libro, sed tio estis nur hazarda, mi kredas.

Ĉu ĉiuj el la rakontetoj havas unuigantan temon?

Se ni flankenlasas la nostalgion de La raketo de Freddy revenas, estas demando kiu leviĝas diversmaniere en la ceteraj rakontoj. Plej koncize: ĉu

nia vivmaniero, heredita el Eŭropo, konvenas al tiu ĉi kontinento? La tragedio de la aborigenoj estas parto de tiu demando.

Kiu estas la unua verkita rakonteto?

Tiu nostalgia rakonto pri Freddy kaj lia raketo. Ĝi baziĝas sur veraj okazaĵoj en mia knabaĝo. Cetere, preskaŭ ĉiu fikcia verko mia baziĝas sur konkretaj okazaĵoj.

Kiu estas la lasta verkita rakonteto?

Probable tiu pri Samuel Birrubali Rossiter. Cetere, kelkaj esperantistoj tuj “korektus” tiujn nomojn al, mi supozas, Samuelo Birubalo Rositero. Sed mi ne ŝatas ŝanĝi nacilingvajn nomojn en pseŭdo-esperantajn.

Kiel rimedo por distingi ĉi tiun verkon el viaj aliaj, kiel vi priskribas ĉi tiun libron?

Kiel mi skribis en la enkonduko, tiu ĉi libro estas serio da rakontoj kiuj havas Aŭstralion kiel fonon. La titolo estas iom ironia - Feliĉa Aŭstralio - sed ankaŭ tion mi tuŝetis en la enkonduko.

Dum vi verkas esperantajn rakontojn, ĉu vi pripensas nur en la Esperanta lingvo, aŭ ĉu vi verkas en la angla lingvo (aŭ germana lingvo) kaj poste tradukas la tekston en Esperanton, aŭ ĉu estas alia metodo?

Mia verkmetodo estas jena: ĉiam mi unue verkas ĉapitron en Esperanto (kaj do pensas Esperante). Poste mi verkas paralelan version en la angla, kaj tiam mi kompreneble pensas

angle. Mi komparas la du versiojn (ili ofte estas laŭvortaj tradukoj unu de la alia) kaj ofte modifas. Alivorte, mi havas tri ŝancojn elpensi la manieron esprimi la ideojn.

(Kam: Parenteze, interesa komparo estas dum mi dormas. Mi sonĝas ĉefe angle kaj kelkfoje Esperante. Tamen, se okazas koŝmaro, verŝajne mi pensas nur angle!)

Kiom da ekzempleroj de ĉi tiu libro, viaopinie, estas distribuitaj en la mondo?

Mi ne scias. Tio dependas de la eldonejo: Internacia Esperanto-Muzeo ne plu eldonas. Mi dubas ĉu oni presis pli ol 1000. Kutime Esperanto-libro bezonas kelkajn jardekojn por vendiĝi 1000-oje.

Leginte ĉi tiun intervuon, oni eble vigne entuziasmiĝas aĉeti la libron. Kiel oni povas mendi la libron?

Se oni malfermas la retpaĝon <http://esperantowebdesign.com/trevorsteele/> oni estas plusendita al UEA kiu vendas la verkon. Probable ĝi estas havebla ankaŭ ĉe aliaj vendejoj, sed mi ne scias pri detaloj.

Kam: Pliaj detaloj pri la libroj de Trevor troviĝas ĉe:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Trevor_Steele
<http://esperantowebdesign.com/trevorsteele/>
<http://www.trevorsteele.co.uk/>

Ĉu vi volas ke aperu ekzemplero de la teksto el via libro en ESK?

Mi ĉiam trovas malfacile decidi tian demandon. Eble la unua paĝo de la unua rakonto (paĝo 7 en la libro).

Ĉu la rakonto La Raketo de Freddy

Revenas estas a) duonfikcia kaj parto de la rakonto estas iomete teatrigitaj aŭ b) tute fikcia?

La rakonto estas grandparte elpensita, sed en mia baza lernejo estis knabo iom simila al Freddy kiu ja faris efikajn eksplodilojn.

LA RAKETO DE FREDDY REVENAS

Mi volis iom ripozi post la senĉesa kurado de “kaptu-la-azenon”. Mi elektis sidi sub la kverko kaj finmanĝi la tomatan sandviĉon.

Aĉ, kial Panjo ĉiam donis al mi tomatan malgraŭ miaj oftaj plendoj?

Dum mi malentuziasme ronĝis, mi rimarkis, ke Freddy Allgood puŝas sian pezan korpon trans la korton. Liaj dikaj femuroj kunfrotis la pantalon-krurojn, kaj li suverene ignoris la mokridojn de aliaj knaboj, kiuj defiis lin veni kunludi. Freddy sola inter ĉiuj knaboj kuraĝis diri, ke li ne ŝatas sporton. Tia diro estus vera hontaĵo el la buŝo de normala knabo en Kverka Valo, sed Freddy ne estis normala knabo.

Mi rigardis la fajre rufan hararon de Freddy, kiu iel ne konvenis kun lia kutime serioza vizaĝo. Sed dum li alproksimiĝis rektlinie, venis al mi la penso, ke Freddy volas paroli kun mi. Malofte li kaj mi havis rektan kontakton, kaj certe estus interese.

“Kent, ĉu ni povas iomete paroli?” La lentuga vizaĝo turniĝis por vidi, ĉu iu rigardas nin. “Volas diri, private.” Li kapgestis for de la lerneja korto.

“Kial ne?” mi leĝere respondis kaj ĵetis la restaĵon de mia tomata sandviĉo en la apudan rubujon. Kun mieno de spiono Freddy ankoraŭfoje duonfermis la okulojn kaj turnis la kapon, kaj kontente ekmarŝis en la direkton de la rivero. Mi sekvis, ankoraŭ malema imiti la spionan marŝmanieron, sed kun forta intereso. Ial la aŭdebla susurado de liaj pantalonkruroj donis aŭtoritaton al nia misio, kaj certe estis misio, ĉar Freddy estis Freddy.

Ni - tio estas Freddy – decidis halti malantaŭ la granda Ferŝela eŭkalipto tuj apud la riverborda klifeto. Kompreneble estis malpermesite desupri de tiu rando, sed Freddy tre amis esplori la periferiojn de tio, kio estas permesita. Lastan fojon Freddy ĉirkaŭĵetis lentugan rigardon kaj ŝajnis konvinkita, ke neniuj subaŭskultas.

“Kent, ili diras, ke via Paĉjo havas multajn .303-ajn kuglojn el la Milito. Ĉu vere?” Aha! Freddy volis havi kuglojn por eksperimento. Ekscita perspektivo! Iam Keith Watson “pruntedonis” al Freddy botelon da metilalkoholo, aliffoje Cliff Jaeger, la filo de la apotekisto, ŝtelis por Freddy iom da pura alkoholo. Dum ioma tempo kaj Keith kaj Cliff rajtis fanfaroni pri sia rolo kiel komplico de Freddy. Kaj eble nun estos mia vico. Mi subpremis mian emon kaj decidis aktori varbendulon.

“Eble jes, eble ne. Kaj Freddy, kial vi volas .303-ajn? Ĉu vi havas .303-an

fusilon? Mia Paĉjo diris, ke ili estas terure danĝeraj, ili mortigis milionojn da homoj dum la Milito.

“Ha, do li ja havas!?”

“Mi diris, ke eble. Kaj mi ne volas doni al vi kuglojn, se mi ne scias, kial vi volas havi ilin.”

“Ha, certe li havas!” Freddy povis jam iom triumfi, sed mi rifuzis facile kapitulaci. Freddy ekkomprenis, ke necesos inici min almenaŭ iomete en la planon. “’skultu, Kent, mi ne volas la kuglojn mem. Mi forĵetos tiun parton, kiu mortigas homojn.”

Sed tiom da inico certe ne sufiĉis. “Mi ne povas ŝteli kuglojn de Paĉjo, se vi ne diros al mi, kion vi volas havi.”

Doloro kaj eble seriozeco kunpuŝis la lentugojn. “Nu bone. Kion mi volas, estas en la kugloj. Ĝi estas...” kaj lia voĉo preskaŭ neaŭdebliĝis, “....kordito.”

“Ajes,” mi diris aplombe. “Kordito. Jes, mi scias ĉion pri kordito. Mia Paĉjo diris al mi ĉion pri kordito.”

Ĉar Freddy iom tro longe silentis kaj rigardis min, mi sentis embarasiĝon, ĉar mi havis eĉ ne ekideon, kiel kordito aspektas kaj kion ĝi povas fari. Sed ankaŭ mi povis silenti, kaj fine Freddy devis paroli.

Teatrumado en Adelajdo

DE KATJA STEELE (ADELAJDO)

La esperantistaro en Adelajdo havas regulajn klubajn kunvenojn. Ĉu ni povus renkontiĝi ankaŭ alifoje, ĝui la kunestadon en la naturo, en alia urbo, farante ion specialan...? Venis diversaj ideoj kaj nia jara kalendaro ekhavis

preskaŭ por ĉiu monato apartan aktivaĵon. Kelkaj el ili okazis unu foje kaj ne plu, sed aliaj ripetiĝis jaron post jaro kaj ni konstatas ke kreiĝis tradicioj.

Unu el la plej sukcesaj aranĝoj de nia Esperanta jaro estas la teatraj renkontiĝoj, gastigitaj de Patricia Palmer en ŝia loĝejo. La unua okazis en aprilo de 2007. Dek tri el ni ĉeestis ĝin. Ĉiu prezentis aŭ skeĉon, aŭ kanton, poemon, ŝercon.

Jen kelkaj ekzemploj kiel ni amuzis nin:

Dum la unua teatrumado Helen Palmer tre originale montris al ni kiel, en kiaj vestoj, per kiuj iloj, kia maniere ŝi kaptadis koalojn sur Kanguru-insulo.

Sekvajare ŝi kaj Sandor Horvath prezentis pupteatraĵeton. Ni aŭdis inter aliaj el la verkoj de Marjorie Boulton kaj Ralph Harry.

Nia gastigantino tre ŝatas "Winnie la Pu" kaj kunludante kun Helen Palmer aŭ Libby Mortimer jam kelkfoje gajigis nin per la ĉarmaj historietoj. En 2009 ni aŭdis ankaŭ pecon el la Biblio, vidis malaperigi kaj reaperigi ovon kaj aliajn trukojn.


En 2010 Bob kaj Audrey Felby ludis gajan sceneton pri Picasso kaj bildoaĉetanto, Trevor Steele revivigis sian propran travivaĵon ĉe la franca-hispana landlimo. Krom aliajn, ni havis ankaŭ pantomimitajn



Helen Palmer montras manieron por kapti koalojn en Kangurua Insulo. Eble ili povas forgrimpi, sed ili ne povas kaŝiĝi, ĉu ne?



Cathy Taggart konversacias kun sia vigla pupo, kiuj sendube havas fortajn riĉajn personecojn



Trevor Steele drame parolas pri siaj veraj propraj travivaĵoj laŭ la franca-hispana landlimo.

proverbojn kaj pecon el la traduko de Newell de “Hamleto”.

En 2011 Cathy Taggart kunportis kelkajn manpupojn kaj prezentis per ili sian version de “Muzikistoj de Bremen” kaj ni ĝojis ke Cathy kaj la pupoj reaperis ankaŭ ĉi-septembre.

Dek ok homoj, tri el ili novuloj, tute plenigis la salonon de Pat en majo de 2012. De tiu tempo estas la foto pri Charles Stevenson kiu legis rakonton tradukitan el la franca kaj lerte prezentis diversajn rolulojn.

Ĉi-jare ni ĝojis pro la ĉeesto de novaj adelajdanoj Rikardo kaj Amato kiuj, krom esti flue esperanteparolantoj, montriĝis esti ankaŭ bonaj kantistoj. Kaj ni denove ridis pro la ŝercoj, skeĉoj, kantoj kaj bonguste manĝis el la amaso da kunportitaj frandaĵoj – ja parto de nia tradicio estas

ankaŭ tio ke ni nutru ankaŭ niajn korpajn. Zumado de manĝiloj, gaja interbabilado, agrabla ĥaoso. Kaj kiel fini tian sperton? Per plia tradicio: kunkantado. Bob Felby disdonas kantarojn, prenas sian balalajkon aŭ banĝon kaj ni kantas. Ni fartas tre bone kaj esperas rerenkontiĝi venontjare en la sama loko por la sama celo.



Grupo en la salono de Pat en majo, 2012

La Stranga Sono

DE BOB FELBY (ADELAJDO)

Mi veturigis mian aŭtomobilon laŭ la vojo. Proksime al monaĥejo ĉesis funkcii la motoro de la aŭtomobilo. Piede mi iris al la monaĥejo, frapis je la pordo dironte, "Mia aŭtomobilo ne volas iri plu. Ĉu mi rajtas dormi ĉi tie dum la nokto?" La monaĥoj bonkore akceptis min, vespermanĝigis min, kaj eĉ riparigis mian aŭtomobilon.

Provante dormi mi aŭdis strangan sonon.

La sekvan matenon mi demandis la monaĥojn, "kio estis tiu stranga sono?" Respondis ili, "tion ni ne povas rakonti al vi, ĉar vi ne estas monaĥo.

Nu, kompreneble mi estis elrevigita, sed tamen dankegis al la monaĥoj kaj daŭrigis mian veturadon. Kelkajn jarojn poste, la motoro de mia aŭtomobilo ĉesis funkcii tuj antaŭ tiu sama monaĥejo. Refoje la monaĥoj bonkore akceptis min, vespermanĝigis min, kaj eĉ riparigis mian aŭtomobilon.

Tiun nokton mi refoje aŭdis tiun saman, strangan sonon, kiun mi aŭdis jam kelkajn jarojn antaŭe.

La sekvan matenon mi demandis la monaĥojn, "kiu estis tiu stranga sono?" Respondis ili, „tion ni ne povas rakonti al vi, ĉar vi ne estas monaĥo!"

"Bone, eĉ bonege, diris mi, "mi



estas eĉ tre scivola, kion mi devas fari por fariĝi monaĥo?" Respondis la monaĥoj, "vi devas travojaĝi la mondon kaj eltrovi la respondon al la sekvaj du demandoj: "kiom da herbofolioj troviĝas en ĝi, kaj ankaŭ kiom da sableroj". Kiam vi konos la ĝustan respondon al tiuj du demandoj, ankaŭ vi estos monaĥo!"

Komencis mi la nombradon. Kvardek kvin jarojn poste mi revenis kaj frapis je la pordo de la monaĥejo. Mi diris, "mi vojaĝis tra la mondo kaj eltrovis tion, kion vi petis de mi.

Estas 145 bilionoj da herbofolioj kaj 231 bilionoj da sableroj sur la Tero". Respondis la monaĥoj, "gratulojn, nun ankaŭ vi estas monaĥo. Tuj ni montros al vi la vojon al la stranga sono."

La monaĥoj gvidis min al ligna pordo. La monaĥestro diris, "la sono situas malantaŭ tiu ĉi pordo." Mi tuŝis la anson, sed la pordo estis ŝlosita. Diris mi, "tre strange, ĉu mi rajtas pruntepreni ŝlosilon?" La monaĥoj donis al mi la ŝlosilon, kaj mi malfermis la pordon. Malantaŭ la ligna pordo troviĝis alia pordo, sed ĝi estis farita el ŝtono. "Ĉu mi rajtas pruntepreni la ŝlosilon", mi demandis. La monaĥoj donis al mi la ŝlosilon, kaj mi malfermis la pordon. Malantaŭ la ŝtona pordo mi trovis pordon el rubeno (rubin – ruby). Mi petis alian ŝlosilon kaj la monaĥoj



donis ĝin al mi. Malantaŭ la rubena pordo mi trovis alian faritan el safiro. Malantaŭ la safira pordo mi trovis alian faritan el arĝento. Malantaŭ la arĝenta pordo mi trovis alian faritan el oro, kaj tiel plu. Mi malŝlosis pordojn el smeraldo, topazo kaj ametisto.

Fine, ne, finfine, la monaĥoj diris, "tiu ĉi estas la lasta ŝlosilo al la lasta pordo."

Mi estis feliĉa, eĉ feliĉega. Mi malŝlosis la pordon, turnis la anson, kaj malantaŭ tiu lasta pordo mi, je mia granda surprizo, trovis la fonton de tiu stranga sono.

Sed mi ne rajtas diri al vi, kio ĝi estas, ĉar vi ne estas monaĥoj !!!



Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!

De Mark Fettes, Prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA en la okdekaj jaroj, ni havis inter sep mil kaj ok mil individuajn membrojn. Nun la membronombro ŝvebas ĉe la limo de kvin mil. Samtempe, tamen, Esperanto disfloras inter multaj junuloj tutmonde, kiuj danke al Interreto fariĝis aktivaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo; kaj ankaŭ mankas en niaj vicoj multaj ‘veteranoj’ de la movado.

Nia membrovarba kampanjo celas do rekreskigi nian ‘rondon familian’ kiu praktike kaj simbole konsistigas la kernon de la Esperanto-movado mondscale.

Kial do aliĝi al UEA? Ekzistas multaj bonaj argumentoj por tio. Helpu nin disvastigi ilin, dum landaj kongresoj, ĉe lokaj grupoj, en revuoj, en Facebook, lernu.net, radioprogramoj kaj en Esperanto-televido. Kaptu ĉiun okazon por menciigi ke vi mem estas membro de UEA. Per via helpo, nia monda asocio povos rekapti la fortojn bezonatajn por fronti la defiojn de la 21a jarcento!

Per aliĝo al UEA **oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto**. Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Per aliĝo al UEA **oni plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado**. Estas ĉefe la reprezentantoj de UEA

ESK | paĝo 16 | 117 | decembro 2014

kiuj argumentas por la valoro kaj aktualeco de Esperanto ĉe UN kaj Unesko kaj en diversaj internaciaj forumoj. Tiu agado ankaŭ helpas krei kondiĉojn por sukcesa informado sur lokaj kaj landaj niveloj.

Per aliĝo al UEA **oni subtenas instruadon de Esperanto kaj trejnadon de aktivuloj**. Interalie, la AMO-seminarioj de UEA donas rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de homoj sur ĉiuj niveloj de la movado.

Per aliĝo de UEA **oni esprimas solidarecon kun la mondvasta Esperanto-komunumo**. Ĉiujare UEA subtenas kulturajn projektojn diverslande, venigas homojn al kongresoj kaj seminarioj, kaj membrigas junulojn el malriĉaj landoj por doni al ili senton de aparteno al la internacia komunumo. Ofte la dankmesaĝoj de tiaj junuloj al la Centra Oficejo estas ege kortuŝaj.

Kaj ni ne forgesu ke **UEA-membreco ankaŭ donas personajn avantaĝojn**. Inter ili aparte menciindas forta rabato al Universalaj Kongresoj, 10%-a rabato en la Libroservo, kaj abono al la Gvidlibro aŭ Jarlibro kaj la revuo Esperanto, papere kaj rete. Por aktiva esperantisto, tiuj estas nemalhaveblaj rimedoj por partopreni en la movado en tutmonda skalo.

Ne mankas argumentoj. Ni disvastigu ilin! Farante tion, tamen ne forgesu pagi vian propran kotizon, eĉ ankoraŭ por la jaro 2014! Kaj

pagante por la jaro 2015, la jaro de la 100a Universala Kongreso, memoru samtempe pri la ekzisto de aliaj kategorioj per kiuj oni speciale povas subteni UEA, kiel Societo Zamenhof, Dumviva Membreco, aŭ Patronoj de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo Canuto vi povas subteni homojn el malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj.

Ek al rekorda kresko de nia membraro en 2015!

Por aliĝi al UEA en Nov-Zelando, kontaktu:

David Dewar: gddewar@ihug.co.nz

Por aligi al UEA en Australio, kontaktu:

info@esperanto.org.au



Centra Oficejo de la Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo, Nederlando


Holmso en esperantaj vestoj

DE TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Estas la dua duono de la deknaŭa jarcento. Aristokrataj kaj mezklasaj angloj komforte sidas en siaj foteloj kiel lordoj de la mondo. Victoria jam reĝinis dum jardekoj, kaj ankoraŭ jardekojn reĝinos, eĉ imperiestrinos. El la angla vidpunkto la mondo estas pli-malpli en ordo. Jes, krimoj estas farataj, eĉ murdoj, sed oni ne flaras sangon, oni ne vidas kadavrojn kun ponardpikoj. Krimoj prezentas intelektan defion al detektivoj kaj aliaj homoj, kiuj ŝatas solvi enigmojn. Kaj kompreneble la plej fama solvanto estas amato, kiu kapablas diveni mil aferojn pri la laboro, loĝloko, socia klaso, eĉ psikologion de suspektat(in)o el

ŝajne ĉiutagaj aferetoj – eble inko sur fingroj, ĉifitaj ŝtrumpoj, specifa maniero prononci vorton.

La mondo de Sherlock Holmes estas nun tre fremda al ni. Hodiaŭ policistoj uzas maŝinojn por ekzameni kadavrojn kaj krimscenejojn. Kial do homoj daŭre legas la aventurojn de tiu delonge malaperinta ĝentlemano? Eble ĝuste pro tio, ke li vivis en epoko sen komputiloj kaj devis uzi anstataŭe sian cerbon. Ni dankas ankaŭ, ke lia malpli brila partnero d-ro Watson faras demandojn, kiujn ni legantoj, al kiuj mankas la preskaŭ telepatia talento de Holmes, devas fari por povi sekvi la evoluon.



La nomo de Sherlock Holmes eniris simbole multajn lingvojn. Nun vi povas legi liajn aventurojn en Esperanto. Kaj jen problemo: kiel prezenti lian nomon en internacia lingvo? La literoj h-o-l-m-e-s tute ne indikas la anglan prononcon. Ĉu eble ni skribu Hoŭmzo? Ne tre bela formo. William Auld, tradukante La ĉashundo de la Baskerviloj, elektis la formon Holmso, kaj la antaŭnomo iĝis Ŝerloko.

Aleksandr Korĵenkov, kiu iniciatis la tradukon de La aventuroj de Ŝerloko Holmso, daŭrigis la "tradicion" de Auld. Rusoj, pro sia alispeca alfabeto, devas plimalpli fonetikigi alilingvajn nomojn (ekzemple "Hawke" iĝas "Gok").

Al anglalingvulo tiaj formoj, kiaj "Saderlando" (Southerland), "Trednadla" (Threadneedle), "Kruvo" (Crewe), ŝajnas unuavice strangaj, sed oni kutimiĝas dumlege. Kaj sendube ĉinoj kaj araboj preferus la esperantigitajn formojn.

Nu, pri la rakontoj mi nenion perfidu. Eble vi jam konas ilin. Ĉiukaze la aŭtoro lerte devigas nin legi ĝisfine por kompreni la solvon. Kiel dirite, la aventuroj estas baze enigmoj solvendaj per observado de ofte etaj indikoj, kaj tiu Holmso certe estas brilulo.

Tradukis teamo de ok diverslandaj esperantistoj. Ĉiu traduko devis esti kontrolita ne nur de la editoro (Korĵenkov) sed ankaŭ de alia teamano, do grandparte estas konsekvenceco de vortelektado kaj maniero nomi homojn kaj lokojn. Kaj la lingvonivelo certe kontentigas.

Tiu ĉi libro estas sur la listo kiel la venonta legaĵo de la adelajda legogrupa. Ni antaŭĝuas provi diveni la solvojn samtempe kiel Holmso, sed sendube nia pensmaniero pli similos tiun de d-ro Watsono.

Memoriga Celebro de Tilly Aston

25a de Oktobro 2014

DE HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)



Grupo de ok esperantistoj el la Melburna klubo, unu el Adelajdo, kaj nova Esperantisto el Maryborough vojaĝis al Carisbrook en centra Viktorio por ĉeesti celebron por blinda esperantistino, Tilly Aston. La Historia Societo de Carisbrook organizis la celebron kun la malfermo de sensa ĝardeno.

Ni piknikis antaŭ la ceremonio en bela parko apud la vilaĝcentro kaj poste ĝuis la ceremonion kaj lernis multon pri la vivo kaj sukcesoj de Tilly Aston. Bonŝance la vetero estis

favora kaj ni ĝuis promeni tra la vilaĝo.

Post la ceremonio la kampara fajro-brigado preparis posttagmezan manĝeton por la ĉeestantoj kiuj nombris ĉirkaŭ cent personojn. Tio donis al ni la ŝancon paroli kun ili kaj promocii Esperanton.

Ni ankaŭ ĝuis la ekspozicion pri Tilly kiu inkluzivis fotojn de la Esperanto-kongresoj en Adelajdo en 1911 en kiuj ŝi partoprenis.

Tilly naskiĝis en Carisbrook en 1873, la plej juna el ok infanoj. Kiam ŝi naskiĝis ŝi estis blinda en unu okulo sed kiam ŝi atingis sep jarojn la alia okulo ankaŭ blindiĝis. Dum ŝia vivo ŝi laboregis por plibonigi la vivon de blinduloj ne nur en Aŭstralio sed ankaŭ tra la mondo.





La esperantistoj: (Maldekstre al dekstre) Peter, Marcel, Franciska, Michael, Peter, Zachary, Bernie, Jo, Jean



Supre maldekstre al malsupre dekstre: Signo pri la memorigo. La memorigo kaj (tre nova!) senza ĝardeno. La bida sako kaj medalo de Tilly Aston el la kolekto de Vision Australia



La homamaso aŭskultas la ceromonion



Supre maldekstre al malsupre dekstre: Susan Tully, kiu organizis la memorigon, staras kun "Reĝino Viktorio". Michael staras kun parto de la ekspozicio pri Tilly. Ŝtona monumento por Tilly, farita el lokaj historiaj ŝtonoj.

Dum ŝia junaĝo ŝi estis bona studento, kaj estis la unua blinda studento por gajni la matrikulad-ateston kaj ŝi ankaŭ estis unu el la unuaj virinaj universitataj studentoj. Pro la manko de brajlaj skriblibroj ŝi ne povis fini sian universitatan studon. Do, pro tiu manko, ŝi decidis mem traduki librojn brajlen. Ŝi laboregis en tiu tasko kun la helpo de volontuloj. Pro la grandegeco de tiaj libroj kaj la alta kosto sendi ilin al aliaj blinduloj ŝi instigis la fervojkompanion sendi ilin senkoste. Tio finfine estis akceptita, ne nur en Aŭstralio sed ankaŭ en aliaj landoj.

En Aŭstralio dum tiu periodo blinduloj ne havis la rajton voĉdoni ĉe la ŝtata kaj nacia balotoj. Ŝi influis la registaron doni tiun rajton al blinduloj. Tilly starigis la Societon

por Blinduloj en Aŭstralio, kiu nun nomiĝas Vision Australia. Vision Australia provizas multajn rimedojn por blinduloj, specife grandan brajlan bibliotekon kaj aŭskulteblajn librojn.

En 1894 ŝi fondis la Asocion de Verkistoj en Brajlo de Viktorio, kaj en 1904 ŝi mem gajnis premion pro rakonto. Dum ŝia vivo ok volumoj da poemoj estis publikigitaj en Melburno.

Tilly decidis en 1913 iĝi instruisto kaj poste ŝi estris lernejon por blinduloj.

Per Esperanto Tilly skribis al multaj personoj en la mondo. Libro pri ŝia vivo estis publikigita en 1946 kaj ŝi mortis la 1-an de novembro 1947.



Interesaj vidindaĵoj en la aŭstralia ĉefurbo, Kanbero

DE KAM LEE (HOBARTO)

Somere en la Aŭstralia Ĉefa Teritorio, mi ekskursis kun aliaj esperantistoj al bone konataj lokoj en la centra parto de Kanbero, la Nacia Arbararo, kaj Tidbinbilla.

La unua vizito estis al la Nacia Galerio, sude de la Lago Burley-Griffin en lagborda parto de Kanbero. Antaŭ la galerio estas la skulptaĵo 'Fruits of Art' de George Baldesin (1929-1978). Tiu skulptaĵo konsistas el sep grandaj brunaj metalaj piroj kaj ĝi estis la fono de la ekskursi grupfoto. Notinda estis la modernaspekta arkitekturo de

la Nacia Galerio. Estas lastatempe konstruita nova parto kiu enhavas 11 novajn galeriojn de indiĝena arto.

En la Nacia Galerio estas multaj belaj pentraĵoj kaj kelkaj skulptaĵoj de diversaj epokoj kaj stiloj. Unu el la pentraĵoj en la ĉefgalerio estas antaŭe disputebla moderna abstrakta pentraĵo 'Bluaj Stangoj' (aŭ alinome Nombro 11) kiun faris Jackson Pollock en 1952. La Nacia Galerio aĉetis la pentraĵon kontraŭ \$1,3 milionoj en 1973 per la aprobo de la Ĉefministro Gough Whitlam. Dum tiu epoko, la Direktoro de la

Esperantistoj kun la skulptaĵoj "Fruits of Art", kiu konsistas el metalaj piroj, kaj estas verkita de George Baldesin (1929-1978). La verko lokas ekster la antaŭpordo de la Nacia Galerio.





Biciklisto feliĉe biciklas laŭ biciklvojo apud Lago Burley Griffin. Sur la alia flanko de la lago lokas la Nacia "Sonorilejo" kiu konsistas el aro de sonoriloj luditaj per klavaro.

Nacia Galerio ne havis sufiĉan aŭtoritatan kapablon por aprobi aĉetojn kiuj kostas pli ol milionon da dolaroj. La nuna valoro de la pentraĵo estas \$20-\$100 milionoj da dolaroj.

Por tagmanĝo, ni iris al granda gazono apud la Lago Burley-Griffin

kaj skulptaĵparko.

Ni poste piediris laŭ lagborda piedvojo al la Nacia Biblioteko. Laŭ la vojo estas la interesa parolplaco (Speakers' Square) de Regnara Placo (Commonwealth Place), kiu estas levita grandega konkava kvarangula gazono je 100



Sur gazono ĉe la tegementa parto de la Parlamentejo. En la fono estas la turo de Nigra Monto.



Esperantistoj ĉe la parolplaco. Ĉe la fundo de neebena kaj kurba gazono de la placo estas pavimita bildo. En la fono estas la Nacia Galerio.



Esperantistinoj sidas sur ŝtona mureto. La fonto lokas antaŭ de la Nacia Biblioteko.

x 50 metroj konstruita en 2005. Unu flanko estas apud muro kiu estas parto de la apuda monteto, du flankoj havas altajn krutaĵojn kiuj estas proksimume 7 metrojn altaj, kaj la alia flanko estas ligita al la lagborda piedvojo.

Ĉe la centro estas pavimita bildo, donaco al Aŭstralio de la Registraro de Kanado por agnoski la jarcenton de la Aŭstralia Federacio. La murbildo montras la noktajn ĉielojn de la norda kaj suda hemisferoj kaj reprezentas la distribuitajn travivaĵojn de la homoj de ĉiuj nacioj kiuj vivas kune kiel

unu sub la ĉieloj.

Videblaj el unu krutaĵa flanko estas du imponaj vicoj de internaciaj flagoj, kiuj inkluzivas la flagon de Vjetnamio kies desegno estas flava kvinpinta stelo kun ruĝa fono. Vjetnama esperantistino deziris esti fotita kun sia hejmlanda flago sed, kvankam ni atendis dek minutojn, tio ne eblis pro neĝusta blovdirekto de la vento. Tamen, ŝi estis fotita kun la du vicoj de flagoj en la fono.



Ĉe la klifrado de parolplaco. Videblaj estas du vicoj de flagoj flugantaj en la forta vento, kiu estas tiom forta, ke Kieu devis teni sian ĉapelon.

Ni vizitis la Nacian Bibliotekon de Aŭstralio kiu, malfermita en 1968, estas la plej granda referencbiblioteko en Aŭstralio. Imponaj altaj kvarangulaj kolumnoj ĉirkaŭiras la bibliotekon kaj ties alteco estas la distanco inter la biblioteka terplanko kaj plafono de la kvina etaĝo de la konstruaĵo.

Ekspozicio pri kelkaj el la plej malnovaj kaj raraj mapoj kaj atlasoj



Sciencfikcia vidpunkto de la Esperanta movado, ĉu ne? La grandega metala sfero estis trovita dum piediro tra la Aŭstralia Nacia Universitato.



Grupo de esperantistoj apud metala skulptaĵo (Nest III verkita de Richard Moffatt, 2007) ĉe la arbarara rigardejo ĉe Dairy Farmers Hill. Dekstre en la distanco estas Kanbero.



Rigardejo de Dairy Farmers Hill

okazis en la biblioteko. Kelkaj el la valoregaj eroj estas prunteprenitaj el la Brita Biblioteko, la Vatikano, kaj la Nacia Biblioteko de Francio kaj multaj el la objektoj en la ekspozicio estis neniam antaŭe viditaj en la suda hemisfero. Estis 17a jarcenta kopio de la unua mapo de la mondo. Inkluzivita en la kolekto estis la originala mapo de Kapitano Cook de la orienta marbordo de Aŭstralio kaj originala taglibro de Abel Tasman kaj mapo de Nova Nederlando.

Nia posta vizito estis al la Nacia Arbararo kiu havas 250 hektarojn kaj estis oficiale malfermita en februaro 2013. La loko enhavas 100 arbarojn de arboj, kiuj estas simbolaj, formortintaj, aŭ kiuj riskas formorti.

Finfine, turisto ne povas diri ke li/ŝi vizitis Kanberon sin vidi la Parlamentejon. Interesa anekdoto estas ke ni sidis antaŭ la Parlamentejo por fari grupfoton. Mi metis Esperantan flagon en la mezo de la grupo kaj subite policisto venis bicikle al ni. Li serioze diris ke montrado de ne-aŭstralia nacia flago ĉe la Parlamentejo estas esprimo de malrespekto kaj estas ago de ŝtatperfido. Mi respondis ke la Esperanta flago estas internacia flago kaj iomete similas al la flago de la Ruĝa Kruco. La policisto ne ŝatis mian klarigon kaj, pro mia manko de scio pri la situacio, mi metis la flagon en mian dorssakon kaj la disputo pace finiĝis.



Maldekstre estas la konstruaĵo Margaret Whitlam. En la distanco estas Lago Burley Griffin kaj la urbocentro de Canberra.

Ni eniris Parlementejon kaj ni pasis tra sekursistemo. Unu el la membroj de nia grupo aktivigis alarmon dum li trapasis tra sekurpordo kiu detektas metalon. Li portis neniun metalon sed li aktivigis la alarmon dum la dua kaj tria provoj. Finfine, la sekuroficistoj malkovris ke la kaŭzo estas lia magneta ŝlosilkarto. Strange estas ke la problemo ne okazas kun aliaj kiuj havas similan ŝlosilkarton. Mi iomete maltrankviliĝis ĉar du renkontoj kun policistoj okazis en la daŭro de dudek minutoj kaj ĉu okazos tria? Estis mensa malŝarĝo ke aliaj similaj aferoj ne okazis dum ĉi tiu ekskurso.

Alia vizito estis al la Kanbera Spacocentro ĉe la Kanbera Centro de Profunda Kosma Komunikado (Canberra Deep Space Communication Complex), kiu estas la plej granda astronomia antena centro en la suda hemisfero. La loko situas ĉe Tidbinbilla je 35



Malgranda eŭkalipta arbareto en la miniatura planta ekspozicio.

km sudoriente de Kanbero. Ni iris tien aŭtomobile kaj ni vidis belan arbaran kamparon, montetojn, kaj riveretojn. Por la kamparaj lokanoj de Tidbindilla estas surprizo ke tia altteknologia centro ekzistas proksime al ilia hejmo, ĉu ne?

Gvidanto prelegis pri astronomiaj aferoj al la vizitantoj ĉe la Spacocentro kiu estas ankaŭ interesa muzeo pri kosma kaj luna esplorado. Unu el la lastatempaj ekspozicioj estas naturgranda

modelo de 'Curiosity', senhoma scienca veturilo. 'Curiosity' forlasis nian Teron per raketo la 26-an de novembron 2011 kaj surteriĝis sur Marso la 5-an de aŭgusto 2012. La ĉefa celo de tiu projekto estis taksu ĉu ĉi tiu esplorita parto de Marso havas aŭ antaŭe havis medion kiu povas subteni mikroban vivon. La telekomandita veturilo havis ses radojn, 17 fotilojn, kaj veturas maksimume po 200 metroj tage kaj ĝi povis teni kaj analizi grundajn provaĵojn.

La gvidisto poste prelegis pri la radia anteno, DSS 43, la plej granda stirebla parabola anteno ĉe la centro kaj en la suda hemisfero.

La diametro estas 70 metroj kaj ĝi pezas 3 000 tunojn. La areo de la spegula surfaco enhavas 4 180 kvadratajn metrojn kaj konsistas el 1 272 aluminaj paneloj.

Mi rimarkis la malrapidan movadon de la grandega telero dum lia prelego kaj ĝi estis tre mirinda momento. La telero povas movi je 0.25 gradoj sekunde kaj ĝi povas toleri ventojn kiuj blovas je 160 kilometroj hore! Ni poste iris eksteren por rigardi kaj foti la grandegan antenon. Nuntempe ĉi tiu anteno partoprenas en la kontrolado kaj komunikado de la kosma esploro, Voyager 2, kiu estas proksimume 15 590 000

Anteno DSS43 apud la spaca centro en Tidbindilla.
La 70 metrojn larĝa telero malrapide moviĝas.





Grupo de esperantistoj ĉe la spaca centro ĉe Tidbindilla. En la fono estas ekzemplero de "Curiosity", kiu estis sendita al Marso.

kilometrojn for de la suno kaj kies nuntempa celo estas esplori la limon de la suna sistemo. Ĉi tiu kosma aparato estis lanĉita en aŭgusto 1977 kaj jam vizitis Jupiteron (julio 1979), Saturnon (aŭgusto 1981) Uranon (januaro 1986) kaj Neptunon (aŭgusto 1989).

La anteno ankoraŭ partoprenis en la kontrolado kaj komunikado de 'Novaj Horizontoj', kosma esploro lanĉita en januaro 2006 kiu, antaŭvidate, alvenos al Plutono la 14-an de julio 2015. Kvankam estas kelkaj antenoj tie, nuntempe nur tri estas aktivaj kaj du aliaj

estas konstruotaj. La ceteraj ne funkcias. La anteno DS S56 estis malfunkciigita en novembro 2009 kaj ĝi antaŭe fame partoprenis en la ricevado kaj resendo de la unuaj televidaj bildoj de la unua piediro de Neil Armstrong sur la luno en 1969. Ĉi tiu anteno nun estas historia monumento.

Poste, malgranda grupo iris al bruna ŝtala skulptaĵo nomita 'Wide Brown Land' kiu estas parto de la teksto de la poemo 'My Country' de Dorothea McKellar. La skulptaĵo troviĝas en la Kanbera Arbararo, estas 35 metrojn longa, kaj 3



Ĉe la skulptaĵo "Great Brown Land", aro de literoj prezentitaj en kursiva stilo sur monteto en la Nacia Arbararo.

metrojn alta, kaj estis desegnita en la kursiva manskriba stilo de la verkisto. Interesa anekdoto estas ke antaŭ multaj jaroj kiam mi estis elementlerneja studento en Tasmanio, mi estis en ĥoro kaj mi kantis kanton kies liriko estis la teksto de la poemo 'My Country'. Mi ĝis nun ankaŭ memoras la melodion kaj eĉ povas fiere reciti

parton de la emocia aŭstralia teksto. Sentimentala momento kaj interesa koincido, ĉu ne?

Konklude, Kanbero estas tre riĉa kaj interesa loko por kaj kulturkonsciaj homoj kaj homoj kiuj ŝatas fari ekster-konstruajn agadojn.



Kanbero el nigra monto



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Chris Krägeloh | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Treasurer

Bradley McDonald | Secretary

Erin McGifford | Committee Member

Rouan Van Ryn | Committee Member

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Heather Heldzingen | Secretary

Indrani Beharry-Lall | Treasurer

Margaret Chaldecott | Director

Jonathan Cooper | Director

Kam Lee | Administrative Director

Esther Parris | Director

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



venu al MELBURNO

por la 2015
kongreso de esperanto
kaj somerkursaro

Klasoj | Teatro | Muziko | Ekskursoj | Prelegoj
kaj pli

vizitu aea.esperanto.org.au por pli da detaloj



2-11 Januaro 2015